1933/34 ree pruvas tion. Dum tiu periodo estis aranĝitaj 25 kursoj por esperanto kun 485 partoprenintoj, nur 17 kursoj por angla lingvo kun 334 partoprenintoj. En la kursa periodo 1932/33 estis aranĝitaj 18 esp. kursoj k 17 anglaj kursoj. Oni do vidas, ke la nombro de la esp-kursoj pliiĝas. Ĝojige estas ankaŭ, ke la kursoj por socialismo kreskis de 13 al 19.

## Liberpensula Angulo

K-doj liberpensuloj en SAT ! Okazis la 8-an de aŭgusto en Valencio la kunveno de la liberpensula fako de SAT. Ĝia celo estis la restarigo de la fako. Oni unue konsideris la malsukceson de la faka laboro en antaŭaj jaroj, vidante, ke tio okazis pro manko da helpo k kunlaboro de la membroj. Oni plue konsentis, ke en la estonto la laboro devus esti pli dividata inter la membroj k ke ĉiu membro kunhelpu skribi artikolojn aŭ kolekti notojn pri io interesa rilate religiajn aŭ liberpensulajn aferojn en sia lando aŭ urbo k sendi ilin al la sekretario por publikigi ilin en « S-ulo » aŭ en « Sennacieca Revuo ». Oni tiam elektis K-don P. Sch. kiel provizoran sekretarion. La minimuma kotizo estas fiksita je unu respondkupono. Ĉiu membro povas sendi kune libervolan donacon. Oni decidis peti al SAT, ke ĝi informu la SAT-anojn pere de « S-ulo », ke ĉiuj liberpensuloj en SAT sendu sian kotizon rekte al la sekretario. Kie tio ne eblas, oni sendu ĝin al SAT, kiu transdonos al nia fako la monon.

Ni intencas fari nian laboron per ĉiuj niaj fortoj. Nur tiam ni havos fortan, efikan k bone organizitan fakon.

Do, helpu Gek-doj ! Sendu ĉion rilate nian fakon al *P. Schalmey*, Callosa de Segura (Alicante), Hispanio.

## Pri la holandanoj-nomadoj

*Ni resumas skribaĵon de K-do A. Pâris :* Sendante gazetojn al SAT-k LEA-anoj en Francio, mi konstatis kun mirego la nekredeblan nombron da K-doj, « transloĝiĝintaj ne lasinte adreson ». Jam antaŭ du jaroj mi diris al div. K-doj, ke miaopinie la esp-istoj estas nomadoj. Mi konkludas el tio, ke la holandanoj eble ne estas pli nomadaj ol la francoj, sed certe *kutimas informi siajn organizojn pri adresŝanĝoj*, dum... la francoj kutime tion *ne faras* k *perdiĝas* por nia movado. Ni do ne insistu tro pri la holanda nomadeco, sed male gratulu ilin pro regula plenumo de siaj anaj devoj !

## En nia movado

**(Kroniko)**

Francio. *Sankta Dionizio (St. Denis).* Post unutaga restado en Parizo (vizito al vidindaĵoj) la preskaŭ centpersona Holanda peraŭtobusa karavano, revenanta de la Valencia Kongreso, ĝuis gastrajton en nia urbo, antaŭurbo de Parizo, kiu havas komunistan komunumestraron (urbestro J. Dorjo (Doriot)). La Gekdoj tendumis en la « Stadio de l'Unueco » (sportplaco) k ricevis senpagan vespermanĝon konsentitan de la urbestraro. Pri la aranĝoj zorgis K-do Valoris (Vallauris).

Polio. SES (Soc. Esp. Societo de Polio) faris lastatempe malrąpidajn, tamen konstantajn progresojn. Ĝi eldonis (hektografie) 3.300 propagandilojn, varbilojn por la Societo, prospektojn pri koresponda kurso k pri Migranta gazetlegejo. Ni akiris krom 20 anoj en Varsovio 30 en 15 lokoj de Polio. Ni kunlaboras kun LEA « Tagiĝo » en Krakovo (50 m.), lab. grupo ĉe Kooperativo « Vitraj domoj » en Varsovio (20 m.) k grupoj en Gdynia k Kaliŝ. Ĉiuj promesis helpon por eldono de propra bulteno. Jam funkcias ankaŭ Gazetservo k Migranta Gazetlegejo. Malhelpoj ankaŭ estas multnombraj ; du bravajn K-dojn ni perdis per malliberigo (kulpigitaj pro aliĝo al malpermesita politika organizo). — *L.*

**La plej grava helpilo por ĉiu esperantisto estas la**

**Plena Vortaro de Esperanto**

*Dua eldono kompletigita k revizita*

512 pĝ. Formato 14×20 cm. Prezo : 60 ffr. + afranko (2.40 fr. por Francio, 4.40 por landoj de la Stokh. konvencio, 6.80 fr. por la ceteraj).
SAT-anoj rajtas je unu ekzemplero por 54.— fr. (afrankite).
*Notu :* Jugoslaviaj klientoj mendu ĉe la firmo *A. Celap*, Trg Kralja Aleksandra 8, *Zagreb*, poŝta konto Celap, nº 33 563. Prezo : : 210 din. inkluz. afrankon.

## Recenzejo

D-ro S. Chazan : *Socialismo, ĝia ideologio k realigo.* Eld. N. Szapiro, Varsovio, Nowolipki 8. Prezo nemontrita. 47 paĝoj. Formato 12×18.

La broŝuro, kies lingvo estas bona k flua, evidente ne havas tre grandan aktualon post la spertoj faritaj en politika k ekonomia vivo de kelkaj ŝtatoj, tiom pli, ĉar la aŭtoro, kies kritiko estas akra k ofte limetas al ofendoj, en sia kritiko neniam citas nomojn, ĉu de partioj aŭ personoj, sed kontentiĝas aludi nur pri « la komunistoj », « revoluciistoj », « kies internacia karaktero estas manko de amo al la patrujo » (!). Ĝeneraligaj juĝoj estas neniel pravigeblaj k senvalorigas ĉiun diskuton.

La aŭtoro deklaras sin « evoluciisto » k forĵetas ne nur la rimedon de revolucio por transformo de l'ŝtato en socialisman socion, sed ankaŭ la perforton entute. Li pledas por « edukado » de la homoj, tiel maturigante ilin por socialisma ordo. Li volas prediki, persvadante la kapitalistojn pri la bono de frateca socio — almenaŭ oni devas tiel konkludi, ĉar li ne konigas al ni la rimedon, per kiu li volas devigi la kapitalistojn, ekzemple la junkrojn, cedi siajn havaĵojn al la socio. Ne estas mirige do, ke li finfine atribuas al la religio (k do verŝajne al la diversaj eklezioj) gravan taskon : malkutimigi la homojn pri la « propraĵo ».

Koncize dirite : Dezirante nebuligi la konscion de la ekspluatatoj pri la klasa karaktero de nia socio, li apartenas al la pioniroj, vole aŭ nevole, de l'kristana aŭ pagana faŝismo k finfine devas tie tute eniĝi — se li ne revenos al la bazo de la batalanta laboristaro. *H. P.*

---

spertu same la mizeron kiel la kompatindaj laboristoj.

*Maljuna laboristo.*

Evidente K-do Maljuna Laboristo ne kontestas la ĝuston de mia aserto, kiun li citis, ĉar ja nur la *fakton* mi konstatis. Mi timas, ke la K-do ne legis tre atente mian artikolon, ĉar aliel li estus povinta konstati, ke ankaŭ mi provis solvi la demandon : « De kie venas tiu ĉi malamikeco ? »

Ne estas facile analizi tiun ĉi komplekson da kaŭzoj, kiuj fine kreas la nunan staton de la internacia proletaro. Ni trovas ekzemple tion, kion la K-do citas : la personan ambicion de gvidantoj, motivojn pri konservo de salajro k bonstata vivo. Sed ni ankaŭ vidas la obstinon de idealemaj homoj, kiuj sincere sekvas la vojon al sia celo. Ni devas bone distingi ambaŭ kategoriojn : la egoistojn celantajn nur la personan profiton — ili estu senkompate eliminataj, ĉar ili evidentigas mankon de *karaktero* —, due la sincerulojn, kiuj praktikas la fanatikon pro nekapablo *konvinki* la aliajn — ili havu nian toleremon k paciencon, ĉar ili evidentigas nur mankon de *scienceca spirito*, kiun oni povas akiri per bona volo. Pasia disputo k interbatado ĉe diskuto de matematikistoj estus ja ridinda spektaklo ! Ni bezonas senpasian diskutadon, en kiu nur la argumentoj valoru. Ni ne povas tro ofte ripeti la esencan karakteron de SAT, kies statuto postulas la sendogmiĝon de la mondkonceptoj de niaj K-doj. Tio ne signifas, ke ĉies opinio estas ĝusta k ke nur ekzistas subjektivaj veroj. Tio pli vere signifas, ke ni cedu la lastan vorton pri la homaj ekkonoj al la plej supera instanco de la homa ekkonkapablo : la Racio. Nur en tiu ĉi direkto ni povas iri por unuigi la spiritojn, kiuj celas la samon. Ĉiuj ceteraj klopodoj estas ekleziecaj, dogmecaj k neniam povas konduki nin sub la saman tegmenton.

Rilate al la gvidantoj, kiuj celas nur la propran profiton, mi diru simple : Forpelu ilin ! Rigardu, ĉu iu diboĉas — forpelu lin ; Rigardu, ĉu iu elspezas pli ol bonkvalita laboristo — forprenu de li la pluson ! Rigardu, ĉu iu nomas sin « socialisto » k tamen malbone traktas edzinon, infanojn, bestojn — malfidu lin !

Tiuj ĉi konsiloj estas tiom elementaj, ke oni povus opinii ilin memkompreneblaj — se la laboristoj estus pli kritikemaj k tial ankaŭ pli sendogmaj.

*H. Platiel.*